

200–249 paŝoj – 63 baladoj

& Meditaĵoj pri la lasta tago de finiĝanta jaro:.....	83	& Ho belulin' ĝis:	111
& Sidis la sinjoro Kato:	84	& Konfeso:	112
& Esperanto, bela esperanto:	85	& La monedo kaj la pavoj:.....	113
& Hovard Hediv:	86	& Naiva poemeto:	114
& Kiel rekoni la amon:	87	& Ne estas diferenco:	115
& L' almozulo:	88	& Ruzulo:	116
& La societo de Pluto:	89	& Certe do okazos:	117
& La tombo:.....	90	& Matena horloĝo:	118
& Murdist-Andrev:	91	& Orkideo:.....	119
& Por D. K.:.....	92	& Vi min trompis:	120
& 12 monatoj:	93	& Dolorosa:	121
& Al molaj plorantoj!:	94	& Ni laŭdu lin...:.....	122
& Eks-promte:	95	& Pli da lumo!:	124
& Kantas amo:	96	& "Stenjka Razin":	125
& La amo estas ŝipo:	97	& Ŝafoj kaj lupoj:	126
& Dek Aforismoj el kiuj ĉiu estas Sentenco ne sen Senco!:	98	& Fabelo:	127
& Adiaŭa vorto de la reĝino:	99	& Revelacio:.....	128
& Kanto de l' trompito:.....	100	& Mia kunulino:	129
& Por amikoj:	101	& Kampulo kaj grafo:	130
& U. S. A.:	102	& Ne rajtas vu iri tra mia kamp':	131
& Ĉu peko?:	103	& Mensogoj ne utilas:	132
& Flugemo:	104	& Ŝi jam konas lin:	133
& Inter du virinoj:.....	105	& Balkonio:	134
& La mulo kaj la di-statuo:.....	106	& Epikuraca kanto:	136
& Maldolĉa kanto:	107	& La kampokanto:.....	137
& Plena ventro:	108	& Pluvo:	138
& Al knabino nur balbutanta Esperanton:	109	& Trompulo:.....	140
& En la tombejo:.....	110	& Vilaĝanino:	141
		& La gaja studento:	142

& Supren la korojn:	143	& Dirvoko de Hjalmar:	146
& Al la juda foririnto:	144	& La vulpo kaj la korvo:	148
& Ĉe kuracisto Zamenhof:	145	& Liss Ulov Larsson:	149

& Meditaĵoj pri la lasta tago de finiĝanta jaro:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 200 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de skanuja polso kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:25> (# Rullande gubbe: La/Lado redo TiiSo;So SoTi doTi LaaLa;La Lado redo TiiSo;So SoTi doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: mi miimifa mido; miso soosola somi; mi miimifa mido; dooredo TiidoTi La La))×8)+

(&Strofoj:

'1 Ho /vi, la lasta membro ; De finiĝanta jaro, ; La lasta de decembro, ; Vi estas – laŭ komparo –

(×:; **En sekva la jaro ; verdos granda arbaro ; Lumiĝos la tagoj ; baldaŭ en sekva la jaro.**)

'2 Mortanta lampiono ; Post fino de festeno, ; Vi estas nur ĉifono ; Brulanta en kameno,

'3 Aŭ disakorda vibro ; De rompiĝanta vazo, ; De senenhava libro, La fina trompa frazo!

'4 Vi estas kisparfumo ; Sur paliĝinta lipo ; Aŭ forŝvebanta fumo ; De jam malvarma pipo!

'5 De tragikomedio ; Nekontentiga fino ; Kaj lasta iluzio ; De laca virgulino!

'6 Vi estas kapdoloro ; Post nokto de orgio, ; De velkiĝanta floro ; Sufera helpokrio!

'7 Vi estas fina ĝemo ; Post teda litanio ; Kaj liberiga tremo ; Post longa agonio!

'8 Foriru, lasta membro ; De finiĝanta jaro, ; Kajvenu post decembro ; Triumfa januaro!!

& Sidis la sinjoro Kato:

< Ripete 12 sed rekante 4 el 25 batoj por strofo, entute 200 paŝoj dum 2 minutoj. El hispana tradukis Liven Dek (Mediterranea Esperanto-Semajno 2016).>

(#Melodio:

<:25> (/somi somi so omi re e do oh; lafa lafa la ati sooso;fa mifa so so so; sola sola so omi re e do h)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Sidis la sinjoro Kato ; (':
sur tegmento en vespero)

(×: ; **mi mi miaŭ mi aŭ** ;)

(,: sur tegmento en vespero.)

'2 Kun propono pri edziĝo ;
ĵus veninta per letero.

'3 Vokas lin katino Blanka ; la
kuzino de Katego.

'4 Pro la hasto Kato falis ; de
tegmento sur ŝoseon.

'5 Kelkaj ripoj derompigis, ;
krakis kolo kaj piedo.

'6 Oni portas lin al tombo ;
rekte preter fiŝvendejo.

'7 Ĉeodoro de sardinoj, ; li
revivi por bankedo.

'8 Ke naŭ vivojn havas katoj, ;
plene pravas ĉi afero.)

& Esperanto, bela esperanto:

< Ripete 27 sed rekante 19 el 31 batoj, entute 201 paŝoj dum 2 minutoj. Laŭ franca popolmelodio "Alouette" verkis H. W. Holmes. Baladigis Martin Strid (2016) per forpreni unu lastan takteron de la rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,7:31>

/do ore mi mi redo remi do So; do ore mi mi redo remi do;

((/dodo domi soso so; sola sofa mire do; soso so SoSo So;

(#Rekantaĵe: so lfa lmi lre; do ore mi mi redo remi do So; do ore mi mi redo remi do;))×6)+

(&Strofoj:

(&R: /Esperanto, bela
esperanto ; Esperanto, lernu
ĝin kun mi!)

'1 /Lernu pri la alfabet', ;
Lernu pri la alfabet', ; Alfabet',
alfabet'!

(&R: e4; **Esperanto, bela
esperanto ; Esperanto, lernu
ĝin kun mi!**)

'2 (: Lernu pri la
gramatik'!)×2 (,:
Gramatik'!)×2 (×: &R)

'3 Lernu pri la elparol'!

'4 Lernu pri literatur'!

'5 Lernu do pri UEA!

'6 Lernu pri la mondkongres'!
.....)

& Hovard Hediv:

< Rekante 12 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #5426. El okcidentnorvega dialekto tradukis Kukoleto (1993 LorE). Klarigoj (*): '1 Flankaŭ = je flanko de. '3 Pita = kompatinde malgranda. ; Tej = tie. ; Kvaj = kiuj. ; Meja = nia. '4 Kveŭ = kiam. '5 Teŭ = tiam. '6 To = tio.>

(#Melodio:

<1,5:2,3> (hLa /mimi fami /mi LaTi /doTi LaSi /La a;mi /mire
misi /ti laso /mimi rere /mi

(#Rekantaĵe: i;mi /miido redo /Ti i;La /mimi fami /mi LaTi /doTi
LaSi /La a)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 "Mi /estas Hovard /Hediv,
a/grabla bona /vir' ; Nun /iras
mi e/dziĝen kaj /por bona/kir'

(×:; **Mi /loĝas flankau***
/mont' ; kaj /al knabin'
pro/mesis, nek /estas
perfi/dont'.)

'2 Mi estas Hovard Hediv, el
montegara laŭb' ; Nun iras mi
svatiĝe, ne plu estados fraŭl'
.....

'3 Bieno estas pita*, sed bona
la arbar' ; Tej* havas mi du
pinojn, kvaj* restos meja*
ŝpar'

'4 Kveŭ* multiĝos infanoj kaj
ŝuld' grandiĝos tro ; forhakos
mi l' unuan, l' alia restos do.

'5 Sed kveŭ mej maljuniĝos,
provizos ĉiu sin ; Teŭ* hakos
mi l' alian, to estos arbarfin'
.....

'6 Ne estis to* mirende ; al
Hovard malbonsort' ; Vojaĝis
li de Longval' en ombraŭtuna
nokt'

'7 Vojaĝis li de Longval', ŝi
estis fianĉin' ; tamen de alia ;
al Hovard nur ĉagren'

& Kiel rekoni la amon:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Klara Ilutoviĉ (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Davida balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/mi mire reedodo dodo; doododo dore mimi; mi mire mimore mimi; soososo faamimi mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×7)+

(&Strofoj:

,& Kiel rekoni la amon:

'1 / Griza malvarma nebulo. ;
Mondo minaca aŭ splena, ;
kiel senhoma insulo. ; Tamen
mi estas ĝojplena.

(×: Bruas dancu en halo,
dancu en ĉen'! ; Ĝojaj paŝas ni
en esperanto-kunven'.)

'2 Nigra envio disrampas ;
Boras rigardo rankora. ; Veron
malver' preme dampas. ;
Tamen mi estas bonkora.

'3 Ĉu povas nun sin defendi ;
homo plorige malriĉa? ; Kion
do morgaŭ atendi?... ; Tamen
mi estas feliĉa.

'4 Se l' bono ĉie brakumas, ;
kiel magia balzamo, ; se en
mallum' ĉio lumas – venis la
amo.

,& Ĉu la sun' rapidas:

'5 Ĉu la sun' rapidas ; estingiĝi
nun? ; Se infanoj ridas – ;
Lumos plu la sun'.

'6 Ĉu la tero hantas ; nigra sen
esper'? ; Se infanoj kantas – ;
Verdos plu la ter'.

'7 Ĉu la viv' pereas ; laŭ la
efektiv'? ; Se infanoj kreas – ;
daŭros plu la viv'.)

& L' almozulo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikisto, 1931) kun piednoto: (*) Karmanjolo: revolucia kanto. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Valdemara balado.>

(#Melodio:

<1,7:29> (/lala sofa fami mifa; sola laso fami; lala sofa remi fala; sofa fami mire;

(#Rekantaĵe: mifa so so; la3la lala lala lala so so; dodo dore mi; mifa so so))×7)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Ĉiutage kun vespero ;
Venas almozulo, ; Kaj li staras
longajn horojn ; Ĉe la
stratangulo.

(×:; **Kantu forte ; frape paŝu
dancon kaj ridetu ; belas
nova tag' ; kantu forte.**)

'2 Viro eble kvindekjara ; Kun
mizera masko, ; Tial, ke
kompaton vekis ; Estas lia
tasko.

'3 Ftiza tuso temp-al-tempe ;
Skuas lian kapon, – ; Pli
insiste li etendas ;
Grasmakulan ĉapon.

'4 Li al bonaj virinetoj ; Bruan
dankon maĉas, – ; Post avaraj
senkoruloj ; Li indigne kraĉas,
.....

'5 Kaj senbrue, malrapide, ;
Kiel li alvenas, ; Li, parenc' de
noktaj ombroj, ; Lame sin
fortrenas... ..

,& Dua:

'6 Ĉiutage dum noktmezo ;
Brute sen kompatato ; Ŝiras min
el sana dormo; Bruo sur la
strato:

'7 L' almozulo kun kolegoj ;
Dancas farandolon ; Kaj ebriaj
ili grakas ; Venĝan
karmanjolon (*)

& La societo de Pluto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo, kaj interŝanĝis la du antaŭlastajn versojn.>

(#Melodio:

<:29> (/La dore mi mi milre falre mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Heraklo, diiĝi²nte², venis ;
en la ĉielon, kaj li partoprenis

(×:; **Venu mastrino en la²
ĉen'** ; **Prenu mian manon en
firma ten'**.)

'2 festenon de la dioj tie. ; Al
ĉiu dio devoscie,

'3 aparte faris li saluton, ; sed
kiam li ekvidis Pluton,

'4 la dion de la tera riĉo, ;
saluti lin kun forturniĝo

'5 evitis li. Kaj Zeŭs tre miris:
; "Sed kial do vi ne deziris

'6 saluti lin?" Je la demando ;
"Ĉar mi plejofte lin en bando",
.....

'7 respondis la hero' severe: ;
"de aĉaj homoj vidis tere."
.....)

& La tombo:

< Rekante 16 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Karel Havliček-Borovský. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(/DoDo MiSo dodo; dodo LaSo dodo; DoDo MiSo dodo LaSo; dodo LaSo TiTi;

(#Rekantaĵe: SoSo SoSo TiTi So; TiTi LaSo Mi; SoSo SoSo TiTi LaSo Fa; TiTi LaSo Mi Do)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Mi konsilas, knaboj ; al vi sen hezito, ; entombigi vin ne lasu ; ie laŭ la rito.

(×: **En la valo staras ĝi, ; staras la tili' ; En la valo verda staras ĝi, ; staras la tilio.)**

'2 Herb' sur tomb' kreskanta ; estus via fino, ; ĉar la herbon formanĝegus ; kapro aŭ bovino.

'3 En solecan meti ; lasuvi tombeton, ; kaj sur tombo igu planti ; junan tilieton.

'4 La konsilo estas, ; knaboj, tute prava, ; super vi printempe sonos ; kant' de l' birdoj rava.

'5 Sur tombeto via ; floras la tilio ; kaj sub ĝi gejunularo ; ŝercos en Julio.

'6 Kaj la floroj estas ; plenaj de mielo, ; kiun sauĉas kaj kolektas ; malgranda abelo.

'7 Noblan havos finon ; vi en form' miela, ; vin en sia kafo trinkas ; eĉ knabino bela.)

& Murdist-Andrev:

< Ripete 17 sed rekante 3 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Norda kantaro #5573. El sveda tradukis Martin Strid (2004-2011).>

(#Melodio:

<:29> (/dore mimi mido re reTi do o; mifa soso soso la sofa so o; mifa soso soso ti; laso mido doLa do; dore mimi mido re reTi do o)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Murdist-Andrev estas mi, estas mi ; Murdist-Andrev estas mi, estas mi ; Murdist-Andrev estas mi, ; senkapiĝos tagon ĉi, ; laŭ la sveda leĝo, fi, ; je Satan'.

'2 (3× Mi ja murdis (: virojn kvar,) '1,2, (: virojn kvar, ;) '3 ; jam ĉielen iris ĉar ; tuj revidos min la ar',)

(×:; **je Satan'**.)

'3 Isto en la ruĝa led', igos min al morto-ced', ; ĉar jen lia vivrimed',

'4 Pastro staras en deĵor', logas per anĝela ĥor', ; sed ĝi restas sen valor',

'5 Ankaŭ venis jen Katrin', estis mia karulin', ; blasfemantan aŭdu ŝin',

'6 Vi atendas al mortkri', la kadavro belos ĉi, ; ĉion scenos mi por vi

'7 Sange haka ekzekut', mia estos tuj tribut', ; kaj mi mortos kiel brut',

& Por D. K.:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtein (1968). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de & Davida balado.>

(#Melodio:

<:29> (o;mi /miimimi miirere reedodo doodo;do doododo dore mi;mi miimimi miimire miimire miimi;mi soso faamimi mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do))×7)+

(&Strofoj:

'1 Por /ĉiam vi restis en mia memoro; ridantaj, kaj sen avid' ; mi sendas al vi kondolencon tutkoran. ; Jen versoj – ankaŭ por vi.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'.**)

'2 Delonge forpasis inundoj, militoj, ; nek krioj, nek pafoj turmen[*tas vin*]. ; Vin ĉiam atendas ĉemiz' amelita, ; taseto kun kafo, fide[*la e*]dzin',

'3 en kies okuloj, bovide kvietaj, ; glacias senkulpa mir'. ; ĵaluze sed dolĉe ŝi ĉiam ripetas: ; – Aŭ esperanto, aŭ mi!

'4 Jen tiel vi vivas en ora feliĉo ; kun dolĉa matena gap', ; kaj poste aperas pepanta filino, ; kaj vidoj, kaj patra gaj'... ..

'5 Sed foje dolori komencas cikatroj ; en via feliĉa anim' ; Kaj en rememoroj – nur vojoj, nur kantoj, ; nur blua ĉielo sen lim'.

'6 Reeĥos en revoj tendaroj turistaj, ; fajrejoj kaj nokta vals', ; kaj ies okuloj, okuloj turkisaj ; sen pigra altruda fals'.

'7 Kaj gratas la koron ekzisto senĝoja, ; maĉata kun abomen', ; ĉar nure en sonĝo vi revas pri l' vojo, ; kiun elektas mem.)

& 12 monatoj:

< Ripete 12 sed rekante 6 el 17 batoj por strofo, entute 204 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:17> (/mimi doodo;do remi fare dodo; mimi doodo;do remi fare mi do;

(#Rekantaĵe: TiSo La Lafa mifa mire do))×12)+

(&Strofoj:

'1 (Januaro: ; ekmarŝas kalendaro.)×

(×:; **Kaj ni paŝas en danca ĉeno jen.)**

'2 Februaro: ; glacio sur la maro.

'3 Marto: ; printempo en la palto.

'4 Aprilo: ; vetero en vario.

'5 Majo: ; ni dancas pro la gajo!

'6 Junio: ; la flora komunio.

'7 Julio: ; somera idilio.

'8 Aŭgusto: ; vino laŭ la gusto!

'9 Septembro: ; rikoltas ĉiu membro.

'10 Oktobro: ; soldatoj al manovro!

'11 Novembro: ; la pelto en atendo...

'12 Decembro: ; last verdo: rododendro.)

& Al molaj plorantoj!:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 205 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (

/SoMi DoMi SoSo Fa La; LaLa SoTi remi falmi do; SoMi DoMi SoSo Fa La; LaLa SoTi reTi do

(#Rekantaĵe: do;Ti doTi dore mido rere So; Mi FaMi FaSo La Fa SoSo Do; SoMi DoMi SoSo Fa La; LaLa SoTi mire do do;

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Vi eraras, ho poetoj, ; Dum delir' de l' nigra febro, ; Kiam, kvazaŭ mortprofetoj, ; Vi invitas al funebro.

(×:; **Leviĝos morgaŭ la matena sun' ; Do kantu gaje en la danco nun ; Kaj dum paŝoj niaj tondras ; Tenu manojn en la ĉen'!**)

'2 Larmebrie vi eĉ kredas, ; Vi keruboj sur la tero, ; Ke vi nian koron knedas ; Kiel koron el butero!

'3 Ĉu do sub la vira brusto ; Spongo larmosorba batas? ; Ĉu do sub hardita krusto ; Laca kor' sin mole vatas?

'4 Ĉesu sentimentaleco! ; Post la sanga ferepoko ; Nia koro estas peco ; De l' plej kruda, forta roko!

'5 Kaj se tamen vi ploradas, ; Faru tion en silento: ; Oni dece ne parolas ; Ĉirkaŭ tomba monumento!

& Eks-promte:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 205 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Helena Melnikova (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (/SoSo doododo Tido re so;so soso soso redo Ti So; SoSo doododo Tido re so; soso laafafa reTi do do;

(#Rekantaĵe:; SoSo doododo Tido re so;so soso soso redo Ti So; So dodo Tido re so; soso laafafa reTi re do o)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Vi ankoraŭ esperon havas?
; Vi ĝis nun homajn vortojn kredas? ; Ho infano, vi estas sankta! ; Ve al vi, stultulaĉ' mizera!

(×:; **Do nun paŝu ni en la ĉeno ; Ĉar danci estas rava beno ; Kun mane firma teno ; Do nun paŝu ni en la ĉeno.**)

'2 Mi ne celas atendi helpon, ;
Nek atendi pohoran velkon. ;
Mi elektos tagon aŭ nokton, ;
mi elektos tempon kaj lokon –
.....

'3 mi forlasos laTeron memstare. ; Ne balbutu, ke pekas mi – vane: ; mi ne kredas inferon, tamen... ; Tie estus almenaŭ varme!

'4 Mia flago senforte pendas, ;
mia flamo ne plu varmigas, ;
miaj vitroj koloraj fendas, ;
mia vento flugadi pigras.

'5 Ili diras: ĉu io gravas ; aŭ vin ne embuskas fino? ; Jes, sinjoro Kajam, vi pravas... ;
Mi foriras aĉeti vinon.)

& Kantas amo:

< Rekante 25 el 41 batoj por strofo, entute 205 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Edmond Privat (Tra l' silento, Letchworth 1912). Baladigis Martin Strid (2016) per per samaj sveda polka melodio kaj rekantaĵo kiel por En kinematografejo.>

(#Melodio:

<:41> (o;so /soososo soososo soofiso laaso;so miimimi miimimi miiremi faami;mi reerere TiiSoTi reerere TiiSo;Ti; reerere miirere dooTiTi LaSo;

(#Rekantaĵe: SoLaSoFa MiSo do ore; miimimi remi fa mi; rere TiiSolTi rere TiiSolTi; rere mire doTi LaSo; SoLaSoFa MiSo do ore; miimimi fami re do))×5)+

(&Strofoj:

'1 Pli bela ol ondo, pli forta ol vento, ; Kantadas la amo plej dolĉan muzikon. ; Ĝi kantas en koro, ĝi kantas al sento, ; Ĝi kantas orgene ravadon mistikan.

(×:; **Flugu la balada vorto ; alte ĝis la plafono ; Tondre draŝu2 plankon paŝu2 ; Sentu, ĉu en ĝi risorto ; Flugu la balada vorto ; alte ĝis la plafono.**)

'2 Ĝi kantas tre longe, ĝi kantas lulante, ; Kaj, unu post unu, la revoj de l' koro, ; Jen kvazaŭ abeloj el oro brilanta, ; Al kampoj de floroj ekflugas en gloro.

'3 Sur blanka siringo jam svenas espero, ; Kaj amo kantadas, dum flugas abeloj, ; Kaj ĉiam pli supre tra nokta l' aero ; Ĝi lulas la revojn ĝis kampo de l' steloj.

'4 Ĉe l' lampoj eternaj en alta ĉielo, ; La oraj flugiloj rondzumas laŭkante, ; Kaj preĝoj infanaj sur voj' de malhelo ; La revojn renkontas al Dio flugante.

'5 Pli bela ol ondo, pli forta ol vento, ; Kantadas la amo plej dolĉan muzikon. ; Ĝi kantas en koro, ĝi kantas al sento, ; Ĝi kantas orgene ravadon mistikan.)

& La amo estas ŝipo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 205 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Anvar Zajsanov (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (

o;So /dodo dore mido re do;do LaLa LaTi doLa So o;So LaLa
LaLa doLa So do o;do TiTi TiTi Tido re

(#Rekantaĵe: e;So dodo dore mido re do;do LaLa LaTi doLa So
o;So LaLa LaLa doLa So do o;do dodo mimi mimi mire do)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 La /amo estas du ŝipetoj ;
sur vasta oceano – viv'. ;
Peladas ilin la tempestoj ;
nehaltigeblaj dis, en driv'.

(×:; **Do dancu kune en la
ĉeno, ; ni dancu ĝis matena
sun' ; kaj ĉiam novaj tagoj
venos, ; esperon kaptu do je
oportun'.**)

'2 Nur fojaŭdiĝas voĉ' sirena, ;
aperas sorĉe brila lum'. ; Kaj
ĉion volvas malserena ;
nebulo densa. Kio nun?

'3 Ĉu plu serĉadi, aŭ despere ;
havenon iri? Eble re, ; espere
al fortun' sencele ; antaŭen
veli, ĝis pere'!

'4 Pro kio da al nia sorto ;
obeas ni? Ĉu la timem' ; pri la
misŝanco nin al bordo ;
forlogas? Eble nia mem'

'5 trankvilon serĉas, kaj
danĝeron ; evitas, volas al
kviet'? ; Sed tiam lasu ni
esperon, ; ne renkontiĝos la
ŝipet'.

& Dek Aforismoj el kiuj ĉiu estas Sentenco ne sen Senco!:

< Rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 209 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Esperanta geedziĝo".>

(#Melodio:

<:19> (/So dodo doSo LaLa LaaMi;Mi FaFa SoSo SoRe Mi
Mi;So dodo doSo LaLa LaMi; FaFa SoSo SoTI Do Do
)×11)+

(&Strofoj:

'1 /La elefant', la granda besto,
; Ne loĝas en birdeta nesto.

(×:; **Ho, estu vi amiko mia ;
restu kun mi en la ĉeno!**)

'2 La hundo svingas sian
voston,; Se vidas ĝi viandan
oston.

'3 Feliĉa estas fiŝo tuta, ; Ĉar
fiŝedzino estas muta.

'4 En akvo banas sin saĝulo, ;
Sed akvon trinkas nur stultulo.
.....

'5 Ne sendu vi al princa moŝto
; Putrintajn ovojn per la poŝto.
.....

'6 La piro kreskas sur la arbo, ;
Sur viro kreskas nur la barbo.
.....

'7 La pulo saltas en galopo ;
Eĉ sur krani' de episkopo.

'8 Paseroj manĝas ĝis plensato
; Ĉevalproduktojn sur la
strato.

'9 Normala viro dumberie ;
Subtenas murojn plej konscie.
.....

'10 Prudenta hom' ne iras,
vere, ; Al necesejo senpapere!
.....

'11 (Tiujn aforismojn plej
zorge deklamu, ; por ke neniu
el tiuj dek lamu!!))

& Adiaŭa vorto de la reĝino:

< Rekante 17 el 35 batoj por strofo, entute 210 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Marie Hankel (1910; Sableroj, Leipzig 1911). Baladigis Martin Strid (2017) per sveda melodio kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

(#: <:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa (#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mi; mi3re doTi rere mi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a;))×6)+

(&Strofoj:

'1 /Nun la bela jaro pasis, ;
Ĉarma revo, kora ĝojo! ; Ĝi
postsignojn gajajn lasis, ;
Floroj kreskis sur la vojo!

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun
rakonton ; Sonu laŭde kun
la fonto ; Plankon paŝe,
drume draŝe ; Estu
interhoma ponto.**)

'2 El la vasta regiono ; Multaj
laŭdoj kaj gratuloj ; Venis al
la reĝa trono ; De sindonaj la
subuloj.

'3 Ĉu, songante mian revon, ;
Ĉiam bone mi regadis? ; Kaj
plenumis mian devon, ; Dum
aliaj bataladis?

'4 Por batalo kaj laboro ;
Premas kore min la manojn, ;
Dankon sentas mia koro: ; Mi
amegas la regnanojn!

'5 Ĝoje sonu mia kanto, ;
Entuziasme, kun adoro, ; Por
la kara Esperanto, ; Nia beno
kaj trezoro.

'6 Mi reĝino ne plu estos - - ;
Pasis jam la bela jaro! ;
Membro mi humile restos ; De
la diligenta aro. -

& Kanto de l' trompito:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 210 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Edmond Privat (Tra l' silento, Letchworth 1912). Baladigis Martin Strid (2016) per islanda melodio kaj parte nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:65> ((La do La do LalTi dolTi La do; Ti mi Ti mi Tildo reldo Ti Ti;))×

(#Rekantaĵe: × mi mi fa fa fa fafa fa mi; rere rere re dodo '1 do do Ti i '2 do Ti La a h)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Post multjara la2bo2rado ;
En ĝardenon de2 l' plezuro ;
Al ripozo e2l pe2nado ; Min
allogis la2 na2turo.

(×:; (**Bone gvidu mian
ĉevalon ; veni hejmen antaŭ
la nokta fal'.**)×)

'2 Multajn rozojn en momento
; Mi kolektis el florbedo. ; Sed
disblovis tuj la vento ; Ĉiujn
florojn de l' bukedo.

'3 Dolĉan prenis mi persikon ;
Kun vangetoj el purpuro. ; Sed

vermaĵon kaj formikon ; Mi
malkovris sub veluro.

'4 Blankan ŝiris mi lilion ;
Puran neĝe kaj marmore. ; Sed
sangantan papilion ; En ĝi
trovis mi dolore.

'5 Belan vidis mi vizaĝon ;
Kaj sur lipojn kisis mole, ;
Sed naŭzigan ruĝigaĵon ; Mia
buŝo tuŝis sole.

'6 Kaj forlasis mi kun tedo ;
La ĝardenon de l' plezuro ;
Sen ripozo, sed kun kredo ; Ke
nin trompas la naturo.)

& Por amikoj:

< Rekante 21 el 35 batoj por strofo, entute 210 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Wisława Szymborska (Vokado al Jetio, 1957). Tradukis Lidia Ligeza (Mi inventas la mondon, 2015). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Torstejna balado.>

(#Melodio:

<:35> (# Torsteins kvæði: /La LaMi MiLa LaLa; SiLa Tido TiTi; LalSi TiLa SoSo MiiMi;Mi dodo dodo remi;

(#Rekantaĵe: redo redo doTiTi La; LaSiSi Tido TiLa SoFa Mi; MiMi DoRe Mi; FaSo MiMi ReeDoDo Do;La La SiTi La a h;)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Ni, kiuj konas spacojn ; de la ter' al steloj, ; pe2rdiĝas en la spaco ; de l' tero ĝis l' kapo.

(×: **Kuras, kuras mia ĉeval' ; Verda veget', ruĝhala arbaret' ; Dancmomenta tret' ; Vigle ludas mia ĉeval' ; En verda veget'.**)

'2 Distas interplanede ; de tristo ĝis larmo. ; Survoje de falso al vero ; vi ĉesas esti juna.

'3 Ridigas min jetoj, ; ĉi fendo de l' muto ; inter flugo kaj voĉo ; – kiel mondrekordo.

'4 Estis forflugoj pli hastaj, ; kies voĉ' malfrua ; elŝiras nin el songo ; nur post pas' de jaroj.

'5 Aŭdiĝas la vokado: ; Ni estas senkulpaj! ; Kiu vokas? Ni kuras, ; fenestrojn malfermas.

'6 La voĉ' subite rompiĝas. ; Post fenestroj steloj ; falas kiel post salvo ; stuk' de muro falas.)

& U. S. A.:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 210 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun enkonduko: "Se longa sekeco..." (*LaVojo.*). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Vilaĝanino". Klarigo (*): '5 Elparolu "Lajbnic", filozofo.>

(#Melodio:

<:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mimi; mi3re doTi rere mimi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a;)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 / Ofte venis el Usono, ;
Kable aŭ eĉ sen fadeno, ;
Brureklama fanfarono ; Pri
mirakla fenomeno.

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun
rakonton ; Sonu laŭde kun
la fonto ; Plankon paŝe,
drume draŝe ; Estu
interhoma ponto.**)

'2 Sentambure, sentrumpete, ;
–Ho kruela ironio – ; Per la
poŝto tre diskrete ; Denun
venas... helpokrio!

'3 Tri literojn ili metas, ; "U.
S. A." sur banderolon, ; Kaj ni

ĝuste interpretas ; "Urĝe
sendu alkoholon!"

'4 Kaj Usona samideano ;
Grumblas, ĉar li ne plu
ĉampanas. ; La soifa
Amerikano ; Tial malpli... ame
rikanas!

'5 Male, Leibniz* ne fi-
kritikas ; La Usonan
akvomanion, ; Ĉar devige ĉiu
aplikas ; Lian
"Limonadologion"!

'6 Ni kongresos, vi profetas, ;
En Usono ĉe ' Du-Deka? ; La
Du-Deka? Ne, mi vetas, ; Ke
ĝi estos la... "Tut-Seka"!

& Ĉu peko?:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 215 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (

/La Lado doTi doTi La La;La Sodo doSo LaTi La La;La Sodo doSo LaSo Fa Mi;So doso somi remi do do;

(#Rekantaĵe: So Lado doSo FaMi Re Do; So doTi dore miso re re;mi fala laso lafa mi do;Ti dore miso remi do o)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Al pastro iris, al konfeso, ;
Koketulino ne plu juna ; Kaj
longe petis pri forgeso ; Por
bagatelo plej komuna.

(×:; **La herbo kreskas en la
kampo ; kaj adoleskos kiu
rampas ; kaj aĝo metos
tedan stampon ; kaj fine
vivo vagos for.**)

'2 "Ne grave" diris tuj konsole
; La pia vir' kun pacienco, ;
"Ĉu tiajn negravaĵojn sole ;
Riproĉas via konscienco?"

'3 Afekte tiam kaj kokete ; La
pekulino eksopiris, ; Kaj pli
mistere, pli sekrete; Ŝi al la
sankta viro diris:

'4 "Vanteco estas la makulo, ;
Ĉar honte pente mi konscias, ;
Ke minvidante en spegulo ;
Mi min tre bela opinias!"

'5 Kaj flustre per pintita beko ;
Ŝi petis lin pri pentofaro, ;
"Sed tio ja ne estas peko!" ; La
pastro grumblis, ... "nur
eraro!"

& Flugemo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 217 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado, mallongigetante la lastan verson per unu silabo difinartikola.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;
(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)
)×7)+

(&Strofoj:

'1 "/Ho flugi², flugi! Kiel rave
; ja estus flugi flugilhave!"

(×: **En la ĉen'** ; **Dancu nun
trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas
; Jen en amika ĉen'** ; **Dancu
nun trankvile.**)

'2 Tiel suspiris rampe-glita ;
testud' en sopirflagro.

'3 Aŭdinte tion, per subita ;
ekpren' ĝin levis aglo

'4 en la aeron supernuben, ; tie
ĝin lasis fali suben.

'5 Okazis, ve, frakaso ; al
membroj, al kiraso.

'6 Kaj la testudo ĝemis laste: ;
"Ho, kial tiu do fantaste

'7 deziras flugi en aero, ; kiu
nur pene rampas sur tero!"
.....)

& Inter du virinoj:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 217 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) ŝanĝinte lokon inter versoj de la du lastaj strofoj pro rimo.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;
(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)
)×7)+

(&Strofoj:

'1 Delogi2s tre matura damo ;
mezaĝan viron, kiun amo

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun
trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas
; Jen en amika ĉen' ; Dancu
nun trankvile.)**

'2 de junulino same ravis, ; kaj
tiuj du virinoj havis

'3 tre grandan zorgon por lin
ligi ; kaj ĉiel al si konformigi.
.....

'4 La harojn ili al li flegis, ;
kaj nia viro feliĉegis

'5 revivi siajn tempojn junajn.
; Nu, sed la dam' la harojn
brunajn,

'6 kaj la knabin' la harojn
grizajn ; elŝiris dum la flegoj
frizaj,

'7 ĝis fine, ho, la aĝa knabo, ;
jen estis li kun kalva kapo.
.....)

& La mulo kaj la di-statuo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 217 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;
(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)
)×7)+

(&Strofoj:

'1 La /mulo2 portis di-statuon,
; kaj multaj fleksis la genuon.

(×:; **En la ĉen' ; dancu nun trankvile ; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen' ; dancu nun trankvile.)**

'2 La best' imagis, ke l'honoro
; koncernas ĝin, kaj pro ĉi
gloro

'3 tia orgojlo ĝin infektis, ; ke
dance, prance ĝi afektis,

'4 kaj sin skuadis, kapriolis, ;
la ŝarĝon de si ĵeti volis.

'5 Bastonon prenis nun la
mastro, ; tradraŝis ĝin kun
kruda drasto,

'6 kaj kriis al ĝi por admono: ;
"Vi estas, lernu per bastono,
.....

'7 ne dio kaj nemortemulo, ;
sed di-statuoporta mulo!"

& Maldolça kanto:

< Rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 217 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Al la semanto.>

(#Melodio:

<:31> (a;do /(domi somi remi faami;mi remi fare fami doodo;do)×

(#Rekantaĵe: LaLado miso somi remi; fami reremi fami domi; TiTire dore doTi LaSo LaLa La)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Ek/iri, kiel la migruloj... ;
Sen cel', sen hejmo vagi sola,
; Ne turnu sin plu la okuloj ;
Al la ĉielo senkonsola!

(×:; **Do paŝu fiere en la ĉeno**
; **Manoj kune en firma teno** ;
Aŭdi rakonton de la klara
voĉo jen.)

'2 Nur ridi belon la naivan ;
De la printempa floroĉarmo, ;
Kaj lipon havi, sensoifan, ;
Avare ŝpari je la larmo

'3 Rezigni pri ja vana lukto, ;
feliĉon ankaŭ venk' ne portos,
; Rezigni pri la amvolupto ;
Sciante, ke en naŭz' ĝi mortos.
.....

'4 Ne lasi plu, ke min ektentu ;
Am' de virino, de amiko. ;
Brilegaj aĵoj, sed, atentu!, ;
Dissaltos, kiel sapveziko.

'5 Kaj se espero ŝajnus, rava, ;
Ne kapti ĝin per mano trema, ;
Ĉar ĝi ne estas ŝnuro sava, ;
Araneaĵ' nur, ŝiriĝema.

'6 Kaj iri nur, sen cel', sed
fido, ; Sen idealoj, sen deziro,
; Sur vangoj, sen la ŝmink' de
rido, ; Kaj pri la mort': kun
ŝultrektiro...

'7 Kun frostaj vangoj, frosta
sento ; Ekfali sur la bulon
teran, ; Kaj kun la vekrianta
vento, ; Ekkanti kanton
malesperan...)

& Plena ventro:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 217 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi lmi dolre mi mi mido re fa; mimi mimi mido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do))×7)+

(&Strofoj:

'1 Ka2va2 kverk' en kampo
staris, ; kaj bonnaza vulp'
elflaris,

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun
trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas
; Jen en amika ĉen' ; Dancu
nun trankvile.)**

'2 ke manĝaĵojn en tornistro ;
kaŝas tie la paŝtisto.

'3 En la kavon ĝi sin ŝtelis, ;
manĝis, ĝis la ventro ŝvelis
.....

'4 tiom, ke la tromanĝema ;
plu ne povis eĉ kun ĝema

'5 kaj plej pena fortostreĉo ;
sin elŝovi tra la breĉo.

'6 Diris vulp' alia: "Gasto! ; Vi
eliros nur post fasto,

'7 aŭ eligos vin bonece ; la
paŝtisto, sed po-pece."

& Al knabino nur balbutanta Esperanton:

< Rekante 18 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:37> (/mi mimi remi doTi La;La LaLa dodo dore mimi; mi mimi remi doTi La;La SoSo SoSo doTi La La,

(#Rekantaĵe: So So LaLa dore mi mi; Ti Tido reTi doLa So; So So LaLa dore mi mi i;)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Knabino, eta blondulin', ;
Viaj okuloj mute plendas: ; Ne
servas via lango vin ; Tre bone
kaj vin ne defendas.

(×: **Florojn lulas vento
varma ; Kreskas la tigoj el la
ter' ; Florojn lulas vento
varma.**)

'2 Se vin atakas malicul' ; Per
pika ŝerc', petola ruzo: ; Vi
nur balbutas, en okul' ; Aperas
time la konfuzo.

'3 Sed tiam, kiel per kiras' ; La
kavalir' sin brile armas, ; Jen,
super via embaras' ; Ridet'
aperas, venke ĉarmas.

'4 Kaj ekfulmetas mil kaj mil ;
Radioj, kiel la fajreroj. ;

Virkoro! Gardu pri l' trankvil',
; Atentu pri la bruldangeroj!
.....

'5 Ho, vi, muteta blondulin', ;
Kun brila rid' sur roza vango, ;
Ja tio ne ĉagrenu vin, ; Ke ne
obeas via lango.

'6 Ne hontu pro balbuta vort', ;
Havu kuraĝon kaj memfidon. ;
Ja donis al vi bona sort' ;
Armilon brilan: vian ridon.
.....)

& En la tombejo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝto 1923). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por Interkona balado minore kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

(#Minore: /LaLa LaaSiSi LaTi do;re mimi miidodo LaaLa;La Lado; Tido TiiSiSi MiSi Ti;do LaLa LaaSiSi LaaTi;Ti dore;

(#Rekantaĵe: mi mido LaLa Lado; mimi remi fami; rere reTi SoSo SoTi; rere dore mire; doTi LaTi dore miSi La La a))×6)+

(&Strofoj:

'1 /En tombejo vagadis mi. ;
Loganta gesto de l' morto ;
min vokis. ; Nuda rido de
homkrani' ; ĉe l' vojo plende
pri l' sorto ; nur mokis.

(×: **Dankon! La lokon donu ;
dekstren en la ĉeno ; ke ni
ankaŭ tiun konu ; ĝojaj ĝis
reveno ; kaj aŭskultu ĉion
ĝis mateno.**)

'2 Mi, kun tim' de vivanta
hom' ; rifuĝi penis, sed vane, ;
per kuro, ... ; ĉar ĉi nevidebla
fantom' ; min pele sekvis
rikane... ; Teruro!

'3 "Vin mi volas ankoraŭ
Viv'!" ; eliĝis krio de l' koro ;
naiva. ; "Supren! Supren! Ne
al dekliv'! ; Barakti eĉ en
doloro, ; sed viva!"

'4 Penso pri la putranta karn', ;
pri la postmorta nenio ;
plorplendis ; kaj subite por
mia larm' ; kompaton dolĉan
la Dio ; alsendis.

'5 Sur tombaro la flor', cipres' ;
odoron spiris: vivantan ;
konsolon ; kaj komprenis mi
en konfes' ; de muta vorto
konstantan ; simbolon.

'6 "Novan vivon ja naskas la
mort'! ; Nin vidu! Kредu sen
tremo, ; doloro!" ; Por ĉi muta
konsola vort' ; mi dankas Vin
per poemo, ; Sinjoro!!

& Ho belulin' ĝis:

< Ripete 23 sed rekante 9 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Itala popolmelodio. Verkis Renato Corsetti.>

(#Melodio:

<:37> (a;Mi LaTi /doLa aMi LaTi doLa

(#Rekantaĵe: a;Mi LaTi do TiLa do TiLa mi mi mi)

imi remi fare efa mire mildo

(o;mi redo Ti mi Ti do La a)×2

)×6)+

(& Strofoj:

'1 (: Iun matenon vekiĝis mi2)

(×: **Ho! Belulin', belulin',
belulin', ĝis, ĝis)**

(,: Iun matenon vekiĝis mi)
(Kaj tie estis malamik')×

'2 Ho! Partizano forportu min
..... Ĉar mi estas ĉe la mort'
.....

'3 Kaj se mi mortos kiel
partizano Vi devos
entombigi min

'4 Mia tombo estu sur la
montaro Ĉe la ombro de
floreĝ'

'5 Kaj la popolo tien ironta.....
Certe diros: “Bela flor!”

'6 Jen estas floro de partizano
..... Mortis li por liberec'

& Konfeso:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Poemon verkis William Auld. Baladigis Martin Strid per nova rekantaĵo kaj modifo de melodio de Sigurda balado, Norda Kantaro #4401.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Estas kiel sapveziko ;
efemera mia kanto: ; ja ne
temas pri prediko ; nek pri iu
politiko.

(×:; **Zorgojn mi foje forgesas**
; **Mi pri kredo ne promesas ;**
kaj malgajon venkis mi ;
Tion mi ĝoje konfesas.)

'2 Mi ne estas reformanto. ;
Mia sfero: la liriko, ; kiun
verkas diletanto ; sen insista
propagando.

'3 Tio fakte ne signifas, ; ke
maltrafas min realo – ; novan
mondon mi soifas, ; tiucele eĉ
aktivas.

'4 Min koncernas aktualo, ;
Miajn farojn ĝi motivas. ; Kial
do pri klasbatalo ; mi ne
kantas kun lojalo?

'5 Jen la kaŭzo staras nude: ;
mi tro forte sentas pezon ; de l'
inspiro, kiu trude ; trafas
koton luktprelude;

'6 do anstataŭ marsejlezon ;
mi amkantojn faras lude, ; kaj
traktante in-kareson ; trovas
pri la zorg' forgeson.)

& La monedo kaj la pavoj:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 La monedo pavis vante, ; fanfaronis arogante, (; la kunulojn ĝi neglektis,)×

(×:; **Zorgojn ĝi foje forgesas ; La kunulojn ĝi neglektis ; Pavoplumojn prenis ĝi ; Zorgojn ĝi foje forgesas.**)

'2 kial al ĝi plu ne indajn, ; en la korto ĝi kolektis, ; inter siajn plumojn plektis, ; pavoplumojn elfalintajn,

'3 kaj orgojlis kaj afektis ; kun la alpruntita havo, ; siajn paŝojn ĝi direktis ; inter pavojn, kiel pavo.

'4 Krude tiuj ĝin akceptis, ; de ĝi prenis tire-ŝire ; la pavplumojn, eĉ difektis ; ĝiajn proprajn. Hejmenire

'5 tre mizere ĝi aspektis. ; Tie ne estis por ĝi loko, ; la kunuloj malrespektis ; kaj forpelis ĝin kun moko.

'6 (Kurta gloro pavo-vosta ; iĝis por ĝi multekosta.)×

& Naiva poemeto:

< Rekante 18 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1921) "je la naskotago de Zamenhof". Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Mia lingvo.>

(#Melodio:

<1,5:37> (/Mi Mi LaTi doTi Lado; TiMi MiMi MiFi So; La LaTi LaSo SoFa MiFa; SoMi MiMi ReDo Re;

(#Rekantaĵe: Mi LaLa LaTi LaSo So; Mi MiMi MiFi SoSo; MiRe ReMi Do DoRe Mi; LaLa SoSo La La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Blondaj, brunaj homoj
junaj ; Kun ŝaŭmanta vigla
sang'! ; Kantu2 ĥore,
ĝojsonore ; Festan kanton via
lang'!

(×: **Tretu kviete en la ĉen'** ;
**Paŝu en vigla vico ; Dume
kreskas verda arbar'** ; kun
radikoj vastaj.)

'2 Kaj, grizuloj! junaj bruloj ;
Revekiĝu en la sin', ; Kaj
prudento, juna sento ; En vi
frate miksu sin.

'3 Man' en mano, ĉiu ano ; De
la frata societ', ; Faru ĉenon,
datrevenon ; Festsalutu kun
ridet'!

'4 Tag' de nasko! mia tasko ;
Estas: krii kun fier', ; Ke
donacon: sanktan Pacon ; Vi
promesis por la Ter'.

'5 Hom' de Bono! per festono ;
De la am' ni gloras vin, ; Hom'
de Amo! ni en flamo ; Danke
rememoras vin.

'6 En la lukto ĝis la frukto ;
Majstro, helpu per spirit', ; Ke
per veno de Kompreno ;
Pacon donu pacmilit'!

& Ne estas diferenco:

< Ripete 19 sed rekante 14 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931) kun klarigo: (Nova serio). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/mi mifa mire dooTi;Ti LaTi dore mi mi;mi mifa sola tiila;la sola sofa mi mi;

(#Rekantaĵe: mi mifa mire dooTi;Ti LaTi dore mi mi;mi miimifa sola tila;)

solfa mi mi;mi miimifa mire doTi; do Lado doTi La La)×6)+

(&Strofoj:

'1 /La servistino metas ;
Pakaĵojn en la reton ; Dum
nobla pra-praavo ; Ornamas la
tapeton. ;

(×:; **Kaj malgraŭ
diverssenco ; Ne estas
diferenco! ; En ambaŭ
okazoj estas ; ...)** (': portreto.)

(×:; **En ambaŭ okazoj estas ;
...**)

(,: portreto, portreto.)

'2 Insigne la ĉapelo ; Surportas
bantornamon ; Dum juna koko
pruvas ; Fervore sian amon.
..... kokardo

'3 Tro laŭte stulta mulo ; La
tutan nokton blekas ; Dum
lerta malbonulo ; El dormo nin
ne vekas. krimulo

'4 La kuracist' detranĉas ; Kaj
kruron kaj genuon ; Dum ĉe
kaŝita puto ; Ŝi havas
rendevuon. amputo

'5 Plezuravida salmo ; L'
edzinon lerte flatas ; Dum
pene sub la tero ; Ministoj
salon gratas. salmino

'6 En multaj kastoj oni ;
Observas etiketon ; Dum certa
vir' soprane ; (Sed vane) diras
peton. kastrito

& Ruzulo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per sama melodio kiel por Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mi; mifa soso somi mire;
dore doTi LaLa So

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa
somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Viro estis kondamnita ; Al
la morto per la ŝnur'. ; "Ĉar vi
estas nepunita", ; Diris la
juĝisto Knur',

(×: **Zorge li morton
pripensas ; Sentas ke la
sorto densas ; La juĝiston
ruzas li ; Zorge li morton
pripensas.**)

"2 "La ĝardenon vi inspektu ;
Kaj la arbon mem elektu, ; Sur
kiu volas morti vi, ; Kaj vin
sur ĝi pendigos ni."

'3 La krimul' rapide diris: ;
"Simpla estas la afer': ; Rozojn
ĉiam mi deziris ; Dum la vivo
sur la ter'.

'4 Inter rozoj do mi mortu, ;
Rozoarbo do min portu! ; Kaj
tial mi petegas vin: ; Sur
rozarbet' pendigu min!"

'5 "Rozarbeto ne sufiĉas", La
juĝist' informis lin, ; "Ĝi ja
teren tuj kurbiĝas ; Se ĝi devas
porti vin."

'6 Diris la krimul' ridante: ;
"Sed ĝi kreskas ja konstante: ;
Kaj kiam ĝi ne fleksos sin, ;
Nur tiam vi pendigu min!"
.....)

& Certe do okazos:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 224 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #5228. El sveda tradukis Kukoleto (2001).>

(#Melodio:

<1,8:2> (SO /Do3Do DoRe /Mi DoMi /So MiSo /do; MiSo /do3do doMi /SoSo SoMi /Re e /e e;Mi /Fa FaLa /dodo doLa /So SoMi /Do o;Mi /So3So MiSo /Fa3Fa ReTI /Do o /h)×7)+

(&Strofoj:

'1 Se /venos svati/ĝanto
ha/zarde al /mi ; kio /certe do
o/kazos, kredas /mi/ ; ne
/rajtos li /veni en la /ĉambron
ĉe /min ; pro/mesas mi al
/panjo kaj al /vi/.

'2 Sed se li tamen venos en la
ĉambron de mi (×:; **kion certe
faros li, kredas mi ; ne rajtos
li**) rampi en la liton ĉe min
(×:; **promesas mi al panjo
kaj al vi.**)

'3 Sed se li tamen rampos en
la liton de mi brakumi min
nek teni ĉirkaŭ mi

'4 Sed se li tamen tenas min
kaj eĉ karesas min fari
infanon en mi

'5 Sed se li tamen faros
infanon en mi foriri kaj
sola lasi min

'6 Sed se li tamen iras for kaj
sola lasas min ; kion certe
faros li, kredas mi ; li devos
sendi monon per poŝto al mi
.....

'7 Sed se ne sendos monon li
per poŝto al mi ; kion certe li
ne faros, kredas mi ; ja devos
mi voki la helpon de polic'
.....)

& Matena horloĝo:

< Ripete 17 sed rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 230 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961) kun subtitolo "Edzina grumblo". Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> /(mimi so mi; redo mi do)×

(#Rekantaĵe: mimi dodo TiTi LaLa; So doTi La So La La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'5 (Ĝis la kvina - ; anonima.)×

(×:: Ĉiutage li vekigis ; kun la edzina grumblo.)

'6 Je la sesa ; jam progresas.

.....

'7 Ĉe la sepa - ; li jam veka.

.....

'8 Post la oka ; ĵus provoka!

.....

'9 Je la naŭa - ; adiaŭa... ..

'10 Dekaj horoj! ; en deĵoro.

.....)

& Orkideo:

< Ripete 22 sed rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (/mimifa somi re do;do LaLa doLa SoSo; LaLaTi doLa So do;re mimi redo rere;

(#Rekantaĵe: mimifa somi re do;do LaLa doLa So; LaTi doLa So do;re mimi rere do o))×8)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 (/De sur la ekvatoro ;
tutmonden bonodoro!)×

(×:; **Dume la rozoj kreskos ;
en huma nigra ter' ; kaj
burgonoj restos ; portantoj
de l' esper'.**)

'2 Cerbumis orkideo ; pri jena
grandideo:

,&2:

'3 Alia regus ordo, ; kaj sude,
kaj en nordo,

'4 se ĉie blovus vento - ; de
mia sortimento!

,&3:

'5 Sed ĝi forgesis ion: ;
Similan ambicion

'6 ekhavis pliaj dandoj ; kun
bruaĵoj propagandoj.

,&4:

'7 Kaj tamen monda globo ;
rifuzis pri l' aprobo:

'8 Aromo pure loka - ; en
kvanto eĉ sufoka!

& Vi min trompis:

< Rekante 24 el 32 batoj por strofo, entute 224 paŝoj dum 3 minutoj. El ukraina tradukis Semljon Vajnblat.>

(#Melodio:

<:32> (/Lado Lado mimi redo; Tire Tire fafa mire;

(#Rekantaĵe: Lado Lado mimi redo; mimi miSi LaLa La; mi mimi soso fami; re rere fami mire; Lado Lado mimi redo; mimi miSi LaLa La;

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Diris vi, ke florojn lunde ;
ni kolektos tre abunde

(×: **Vane mi atendis vi2n ; Vi min trompis karulin'!** ; **Do, kara, vi min trompis ; Do, erarigis mi2n, ; Do2, min vi tian junan ; frenezigis ĝis la fin'.**)

'2 Diris vi, ke ĝuste marde ;
Kisos mi vin fojojn kvardek.

.....

'3 Vi promesis, ke merkrede ;
promenados ni piede.

'4 Diris vi, ke ĵaŭde certe ; iros
ni al la koncerto.

'5 Vi asertis, ke vendrede ; ni
veturos kune slede.

'6 Diris vi, ke en sabato ; ni
remados en boato.

'7 Diris vi, ke en dimanĉo ; via
iĝos mi fianĉo.)

& Dolorosa:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Antonín Klišterský. Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida baldo ..>

(#Melodio:

<1,6:29> (/mi mire redo dodo dodo dore mimi; mi mire mire mimi soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o))×8)+

(&Strofoj:

'1 /Kun infanet' malsana apud urba muro ; eksidis la patrin' kaj vidis kun teruro,

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'**.)

'2 la fortoj de l' ideto ŝia, kiel svenas, ; spirado kiel ĉesas kaj la fino venas -

'3 kaj de okuloj ŝiaj rulas larm' post larmo. ; Jen preterpasis Kristo inter homa svarmo.

'4 Ŝi al li manojn levis kun sincera peto: ; "Sinjoro, proksimiĝu, helpu al ideto,

'5 ĝi, vidu, mortas jen, kaj vi miraklojn faras." ; Kaj Krist' tuj proksimiĝas kaj pensante staras.

'6 Li vidas lignan krucon, sur ĝi sian finon, ; apude dolorĝemi, plendi la patrinon:

'7 Li vidas, kiel sangas, krevas ŝia koro, ; sed help' ne venas al ŝi en ĉi-tiu horo

'8 kaj oni eĉ ridegas je doloro vana. ; Li tuŝis la infanon kaj ĝi iris sana.)

& Ni laŭdu lin....:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921) "je memortago pri morto de nia Majstro". Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Balado de Virgar, Norda Kantaro #4406.>

(#Melodio:

<:29> (a;Mi /MiLa LaTi TiTi do;re redo doTi TiiMi;Mi LaLa TiTi TiTi do;re redo doTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti doTi La)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 Memora fest' ... dolora fest'!
; Funebre ni solenas. ; Ho
flugis for la flam' de l' kor', ;
Ni kiun larme benas.

(×: **Nun emas mi en danco
jam iri ; dum rozoj, lilioj ;
kreskadas tre.**)

'2 Nek tondra son' nun de
kanon', ; Nek sonoriloj festas,
; Nur batsonor' de nia kor' ; Pri
la solen' atestas.

'3 En vasta mond' malgranda
rond' ; Ja estas nur la fratoj, ;
Sed kun potenc', majesta senc'
; Kuniĝas korobatoj.

'4 Ho kunsonor' de nia kor' ;
Funebru la benatan, ; De kies
am' flagranta flam' ;
Kunfandis rondon fratan.

'5 Estingis sin la flam' de l' sin'
; Plu ĝia varm' ne hardas, ;
Sed staras jam fandaĵ' de l' am'
; Kaj spite frostoj — ardas.

'6 Ĝin flegu ni, ardegu ĝi, ;
Ĝis el malgranda sfero ; Post
vintra frost' la Pentekost' ;
Alvenos al la tero.

'7 Ĝis kun ĝojbril' flamlangoj
mil ; Tra l' tuta mond'
disflugas ; Ĝis falas, jen, la
peza ĉen' ; Nun kiu langojn
jugas.

'8 Ĝis en kompren', eterna ben'
; Fratiĝos mondo tuta... ; Ni
laŭdu Lin, ke aŭdu nin ;
Homaro surdemuta.)

& Pli da lumo!:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Bresta balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (/dolTi redo doTi TiiTi;Ti La3La LaMi LaLa; LalTi doTi TiTi TiiTi;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Du2m nigre nigra nokto ;
Promenis tra l' arbaro ;
Pe2rdinte sian vojon ; La
geamanta paro.

(×:; **Paŝu gajan la dancon ;
Brilas aŭroro bele taga ;
Venu en alta somertemp'!**)

'2 Precipe pro mallumo ; La
geamanta paro ; Ne plu
sukcesis trovi ; Eliron el
arbaro,

'3 Kaj sole solaj ambaŭ ; Jam
ne kuraĝis spiri, – ; Sed la
junulo konis ; Rimedon por
eliri!

'4 Rimedo por lumigi ; De
nokto plej malhela ; Facile ja

troviĝas ; Ĉe knabineto bela ;
.....

'5 Kaj ĉar ŝi bela estis, ; En
kor' de l' juna viro ; Subite
arde... *brulis* ; Pekeca
amdeziro!

'6 Ĉe la knabin' responde ; Al
lia am-espero ; En bluokuloj...
fulmis ; *Helege ĝoj-fajrero!!*
.....

'7 Elektran fluon sentis ;
Tuŝante ŝin la viro, ; Kaj
sekve tuj fariĝis ; Li la elektra
piro!

'8 Li nun pri amo petis ; Kun
flamo de l' ampeto, ; Kaj scias
ni, ke *lumas* ; La *flamo de
lampeto!!*

& "Stenjka Razin":

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtejn. Baladigis Martin Strid (2015) per melodio de feroa balado Roncevala batalo (Runtsivalsstriĉiĉ) kaj modifita ties rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (/mimi faamimi mire doLa dodore mi mi; miidodo dore redo doLa doodore mi mi;

(#Rekantaĵe: mimire doTi LaSo La;La dore mimi mi; mido dore redo doLa do Ti La a)

)×8 +)

(&Strofoj:

'1 /Tio povus okazi nur post kvina pokalo! ; Kantas mi "Stenjka-n Razin"; en krepusko de l' halo.

(×: **Velas el persa lando mi ; kun flame arda kor' ; blovas mian sonĝon (varma vento)?(sanga sento) for.)**

'2 Levas voĉon libere; super rond' aŭskultanta, ; kaj ekflugas etere tiu plendo glorkanta.

'3 Pacan Knajpo-publikon Volga-ondoj atakas. ; Al mi ŝajnas, ke mi kun kozakaro kozakas,

'4 ke la persa princino min amore karesis, ; ke en nokta senfino mi ja ĉion forgesis,

'5 ke l' kozakoj-kompanoj nun min moke blasfemas, ; ke l' persin' en la manoj antaŭsente ekstremas... ..

'6 Mia voĉ' ekdubetas, ĉasas plian koktelon, – ; mi en Volgon ne ĵetus amatinon, la belan.

'7 Sed post dozo da vino pretas agi fatale. ; – Eĥ, adiaŭ, persino! – mi ekklekas finale

'8 pri la amo ensorba, pri libero ekkria... ; Kion ŝatus mi sobra, tion kantas ebria.)

& Ŝafoj kaj lupoj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sudinsulaj melodio kaj rekantaĵo de Jalgrujma balado, Norda Kantaro #4407.>

(#Melodio:

<:29> (a;La /LaLa Tido TiLa La3;Mi LaLa Tido TiiLa;La dore mi3mi fami mi;mi redo mimi miLa; (#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 Militis jam de longa temp' ;
la ŝafoj kun lup-hordo; la
lupoj venkis laŭ kutim' ;
havante pli da forto.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme
; nun tretu fiere ĉiuj en la
ĉen' ; staras jen mastrino.**)

'2 La ŝafa grego fine do ; kun
hundoj sin federis, ; kun help'
ilia venkis la ; lup-hordon, ĝin
forpelis.

'3 Post kelka tempo lup-sendit'
; aperis ĉe l'ŝafrupo, ; kaj
diris: "Kial la batal'?" ; La ŝafo
kaj la lupo

'4 ja povas vivi kune, en ;
konkordo, pac-anime, ; kaj ve,
ni tamen, sen sekur', ; eterne
tremas time.

'5 Ni, lupoj, estas bona gent', ;
la pacon ni plej amas, ; vi,
ŝafoj, sur la tuta ter' ; pri via
mildo famas.

'6 La hundoj — tiuj ja sen ĉes'
; kverelas kaj intrigas, ; en
pac' eterna vivos ni, ; se tiujn
vi forigas."

'7 La belajn vortojn kredis la ;
ŝafaro, kaj naive ; la hundojn
ili sendis for. ; Atendis
venĝsoife

'8 la lupoj, tiujn sur la kamp' ;
atakis kaj masakris. ; La
ŝafojn rabis ilin nun ; nenio
jam obstaklis.)

& Fabelo:

< Rekante 24 el 47 batoj por strofo, entute 235 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923) kun noto "Muziko de A. Gurilev". Baladigis Martin Strid (2017) per partoj de polka-mazuria melodio de Aleksandro Gurilev kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:47 > (/mifa mi re doTi La Ti; MiFa Mi Ti LaTi do; mifa mi re doTi La Ti; MiFa Mi Ti LaLa La a

(#Rekantaĵe: dore do la somi do re; mifa mi Si mifa mi La; dore do la somi do re; mifa mi dolre mi mi i)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Plenan lunon sur ĉielo ;
miris eta princidin' ; kaj
ekĝemis amsopire: ; "Pala
lun', mi amas vin!"

(×:; **Se vi venas vidalvide ;
pasas plu mi tro rapide ; se
vi venas vidalvide ; en la
danca2 ĉeno.**)

'2 Plena luno sur ĉielo ;
komprenante movis sin ; kaj
reflustris la respondon: ;
"Ankaŭ mi vin, princidin!"

.....

'3 Dum silenta rava nokto ; per
eterna ĵura vort' ; pala lun' kaj
princidino ; ligis sin al sama
sort'.

'4 Kaj de tiu sorĉa nokto ; kun
sufero dolĉa flam' ; brulis en
la etaj koroj ; pro turmenta
vana am'.

'5 Malespere plorĝemante ;
kun sopiro en anim' ;
konsumiĝis pro l' doloro ;
plena lun' kaj princidin'... ..)

& Revelacio:

< Ripete 27 sed rekante 7 el 47 batoj por strofo, entute 235 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis K. Frolov. El rusa? tradukis M. Korotj kaj Vladimir Soroka. Baladigis Martin Strid per modifo de sveda polso el Orsa.>

(#Melodio:

<1,6:47> (

/(laso fa mi redo LaTi SoSo; doTi dore dollado TilSoTi La;) \times 2

(didi La di re dilre fa lalfa mi di;) \times 2

(#Rekantaĵe: soso lala somi sofa remi do o)

) \times 5)+

(&Strofoj:

'1 /(Ho amik' aŭ homo
nekonata, ; Prenu vi dolo2ron
de2 l'anim'. ;) \times (Tuta mond'
forgeso2s pri ma2lsato, ;) \times

(\times : **Tamen nur se paco regos
inter ni.**)

'2 Volas mi, ke ĉiu samterano
; Aŭdu nun pri mia opini':
Lasos nin teruroj de malsano,
.....

'3 La rigard' radias je rideto. ;
Mano manon premas en uni'.
..... Eĉ river' ekfluos en
dezerto,

'4 Ĉiuj ni ne rajtas eĉ en
pensoj ; Je militkostumo vesti
nin. Flugos ni al foraj
universoj,

'5 Ĉiu tag' de senmilita vivo ;
Gvidu nin al monda harmoni'.
..... Kredu do, ni fari povas
ĉion,

& Mia kunulino:

< Rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 238 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Vilmunda balado.>

(#Melodio:

<:34> (

/fami sofa fami mire; rere dore mimi; miimimi fami fami faso;
sofa fafamii redo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so
sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Ke vi plaĉas al deziroj, ;
Tion mi ja scias, ; En la urbo
ĉiuj viroj ; Min pro vi envias...

(×: **Dancu mastrino ; belan
elektas mi. ; Dancu min al
mano ; ja bele kiel povas vi2.
; Dancu mastrino.**)

'2 Ĉar vi estas vere bela, ;
Varma sub la tuŝo, ; Kaj
dolĉaĵo purmiela ; Por ĝuema
buŝo!

'3 Mi vin amas, ĉar konsole ;
Splendon vi forprenas ; Kaj
precipe, ĉar vi sole ; Al mi
apartenas;

'4 Ĉar vi ofte dum enua ;
Nokto min amuzis, ; Kaj ĉar
estis mi l' unua, ; Kiu vin
ekuzis!

'5 Dank' al vi la vivo fine ;
Havas taŭgan centron: ; Mi
plenigas laŭdestine ; Vian
rondan ventron,

'6 Kaj vi baldaŭ fajrobrula ;
Ardas ĝoj-feliĉe ; Kaj dum
memofer' stimula ; Mortas
konsumiĝe... ..

'7 Tamen vi sindone restas ;
Sur suĉanta lipo, ; Kaj mi
sentas, ke vi estas ; Mia kara
pipo!

& Kampulo kaj grafo:

< Rekante 12 el 20 batoj por strofo, entute 240 paŝoj dum 3 minutoj. Kantas Kapreol'. El nederlanda tradukis Roel Haveman.>

(#Melodio:

<:4> (/Lami mimi faamire mi3;do /do3do reedore mi i;Mi /Lado
Tire doodoTi La /do re doodoTi La; /doLa TiLalSoo La ah
)×12)+

(&Strofoj:

'1 Kam/pulo dancis apud la
graf' ; Kam/pul' kaj graf' estas
sam' ; Al/iĝis jen fiera knabin'
; /Verve danci2s ŝi, /ĉarme
rava2 dam'.

'2 Tri fratoj venis anka2ŭ
danc'

(×:; **Kampul' kaj graf' estas
sam' ;**)

kun fia bofratino en rond'

(×:; **Verve dancis ŝi, ĉarme
rava dam'.**)

'3 La bofratino malicis al ŝi
..... kaj diris ke ŝi estas
ĉiesulin'

'4 Ĵetiĝis ĵetkuboj je tria foj'
..... La sort' montris al plej
juna2 frat'

'5 Li selis la ĉevalon por si
kaj rajdis al la hejm' de l'
fratin'

'6 "Bonvenas vi, ho kara frat'
..... Ĉu plaĉus al vi vin' aŭ
med'?"

'7 "Nek vin' nek medo plaĉas
min Ĉar mi plenumu
juĝo2n nun"

'8 Vi plenumu juĝon nun
Ni kune iru al la ĝarden'

'9 La glavon elingigi2s li
Fratinon senkapigis la frat'

'10 Sangeroj gutis en la2 kort'
..... Sammultaj kandeloj lumu
por ŝi

'11 Kolomboj blondaj flugis al
ŝi kaj portis ŝin al la
paradiz'

'12 Korakoj nigraj flugis al li
..... kaj portis lin al
infektoheder'?infer'

& Ne rajtas vu iri tra mia kamp':

< Ripete 24 sed rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 240 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4822. El nordsveda dialekto tradukis Kukoleto (1993 IORE). Klarigoj (*): '1 vu = vi unu.>

(#Melodio:

<1,8:2> ((#A: oSo /SooSo doododo /Tido re /TiiTi LaTi /do)×
(#B: × /sooso mimimi /mifa so /rere faareTi '1 /domi so '2 /do do)
)×7
#A×2
)+

(&Strofoj:

'1 Ne /rajtas vu* iri tra /mia*
kamp', /diris la u/lin'. Ne
/rajtas vu iri tra /mia kamp',
/diris la u/lin'. /Sed nenie
/estas voj', /diris knabo la
/e2ta. /Sed nenie /estas voj',
/diris knabo la /eta.

'2 (Do devas fosi vojon vu,
(×: **diris la ulin'**.)×

(Sed miaj fingroj fro2stas
(×: **diris knabo la eta.**)×

'3 (Do metu sur vun ga2ntojn
.....)× (Sed la gantoj estas
ĉifo2naj)×

'4 (Do fadenfliku la ga2ntojn
.....)× ([Sed ne] ha[vas
ku]dril[on, fa]denon me)×

'5 (Aĉetu kudrilon, fadenon do
.....)× (Sed ne havas monon
me)×

'6 (Do devas akiri laboron vu
.....)× (Sed kion faru labore mi
.....)×

'7 (Ja trovu dungon en la urb'
.....)× (Sed nenie estas voj'
.....)×

'8 (Nu, ne rajtas vu iri tra mia
kamp')×)

& Mensogoj ne utilas:

< Rekante 19 el 27 batoj por strofo, entute 243 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de feroa balado Filino de Torkil.>

(#Melodio:

<1,5:27> (

/sodo dodo rere soso;so somi; soso soso fami remi;

(#Rekantaĵe: fa mimi re do; rere rere rereso soso somi; sososo soso famimi remi; fa mimi re do o)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Viro en gastejon venis,

(×:; **Ja danci** ;)

La mantelon li deprenis

(×:; **Bone min ŝancis. ; Jen mi volas plankon antaŭen danci, ; kvankam vi mian vivon minacis. ; Bone min ŝancis.**)

'2 Kaj sur hoko ĝin pendigis

..... Kaj paperon li alligis

'3 Kun la jena komuniko:

....."Tre atentu la publiko!

'4 Tuŝu ne ĉi tiun veston,

.....Ĉar mi havas ja la peston!"

.....

'5 Ĉe la tablo li eksidis,Li babilis kaj li ridis:

'6 Fine je noktmeza hor'

La mantelo estis for!

'7 Sur la hok' li slipon trovis

.....Kaj sur ĝi li legi povis;

'8 "Mi tre bone vin komprenis,

.....Kore mi kompatas vin.

'9 La mantelon mi kunprenis,

..... Ĉar mi malinfektos ĝin!"

.....)

& Ŝi jam konas lin:

< Rekante 19 el 27 batoj por strofo, entute 243 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de feroa balado Filino de Torkil.>

(#Melodio:

<1,5:27> (/sodo dodo rere soso;so somi; soso soso fami remi; fa mimi re do; rere rere rereso soso somi; sososo soso famimi remi; fa mimi re do o)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Majer volis ĉe rivero (×:;
Ja danci ;)

Kapti fiŝojn por vespero.

(×:; **Bone min ŝancis. ; Jen mi volas plankon antaŭen danci ; kvankam vi mian vivon minacis. ; Bone min ŝancis.**)

'2 Sed la fiŝoj mokis lin
Kaj ne lasis kapti sin;

'3 Fine do al si li diris:
"Fiŝon la edzin' deziris,

'4 Kaj ĉar ĝin ne kaptis mi,
Ĝin aĉetu mi por ŝi!"

'5 "Sed mikaŝu do la veron!
..... Ne fatalan la aferon

'6 Ja sciiĝu la edzin', Ŝi ja certe mokus min!"

'7 Li en fiŝvendejon iris
Kaj al la vendist' li diris:

'8 "Donu karpon vi al mi,
Sed tutfreŝa estu ĝi!"

'9 "Bone, bone, mi komprenas.
..... Kial vi ne salmon prenas?
.....

'10 Estas tute freŝa ĝi!"
Diris la vendist' al li.

'11 "Kial vi pri salm' parolas,
..... Se do karpon mi ja volas?"

'12 "Via kor-edzin', sinjor',
Venis antaŭ kvaronhor'.

'13 Karpo ne al ŝi konvenas,
..... Kaj se de l' rivero venas
.....

'14 Por aĉeti karpon vi,
rekomendu salmon mi!"

& Balkonio:

< Ripete 25 sed rekante 17 el 49 batoj por strofo, entute 245 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis rimpoemon Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per sveda popola marŝmelodio el Iggesund.>

(#Melodio:

<:49> (/Do3Mi SoMi DoDo TITA; LA3SO FASO LALA ReMi; FaMi ReeTildo redo TiLa; SoSo FaaLalSo MiRe DoSO;

Do3Mi SoMi DoDo TITA; LA3SO FASO LALA ReMi; FaMi ReeTildo redo TiLa; SooLalSo FaaReTI DoDo DoDo;

(#Rekantaĵe: Do3Mi Sodo mi3do SoMi; DooMiSo doTi La3So FaRe LA AA;ReMi FaMi ReeTido redo TiLa; SooLaSo FaaReTI Do)

)×5)+

(& Strofoj:

'1 /Greg vojaĝos Balkonien. ; Forpermeso do nenien. (; Laŭ konsil' de2 "Balkonvojo“ ;)× aventuroj lin atendas. ; Tion sperti simple endas, (':; vokas tago2j nur kun ĝojo.) (,;; voka2s tago2j nur kun ĝojo.)

(×: **Jen li sidas en trankvilo ; en sia hejma suna varma bril'; Dum la kafo bolas, mi kanti volas ; pri libertempa jubil' .)**

'2 Greg ne devos pagi monon, ; aŭ pli bone nuran onon. ; Venos tagoj sen insultoj. Greg do foje hejme restu, ; la konsilon ruzan testu ; kaj scivole pri l' rezultoj.

'3 Falis for prepondeprimoj, ; ĉiuj aĉaj flugotimoj, ; ĉia streso, atendado. Greg nur sur paper' forestis, ; sed en vero hejme restis, ; venis kapen eĉ balado.

'4 Balkonion li tre gloris. ;
Baldaŭ oni lin adoris ; pro l'
profundo de l' aŭtoro.
Balkonvojo nun lin pagas, ; lia
famo ĉien vagas: ;
"Balkonvojo, mia oro!"

'5 Fine venis eĉ la ŝtato, ;
venis ĝi kun granda ŝato! ; Kaj
gratulis tre fervore.
Balkonvojo – jen ekzemplo! ;
Nova civitana templo! ; Ni
salutu vin elkore!

& Epikuraca kanto:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 245 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun indiko: (Laŭ germana melodio "Studio auf seiner Reis"). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Vilaĝanino".>

(#Melodio:

<:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mi; mi3re doTi rere mi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a;))×7)+

(&Strofoj:

'1 /Sciu nun, samidean', ; Ke dependas via san' ; De regula bonhumor', ; De ĉiama senlabor'!

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto.**)

'2 Laŭ spertita homa kon' ; Plej utila estas mon', ; Tial do naskiĝu vi ; En riĉega famili'!

.....

'3 La virinoj, jes, en ver', ; Taŭgas tre por am-afer', ; Prunteprenu sen cinik' ; La edzinon de amik'!

'4 Kaj por peli zorgojn for ; Taŭgas ĉiam la likvor', ; Tial trinku kun kuraĝ' ; Eĉ dum plej maljuna aĝ'!

'5 Al sanigo de l' stomak' ; Helpas ĉefe la tabak', ; Tial fumu dum la viv' ; Pli eĉ ol lokomotiv'!

'6 Kaj se malgraŭ la princip' ; Ne plu fumas via vip', ; Estas tial, ke sen dub' ; Malpurigis ĝia tub'!

'7 Vivu am' kaj bonhumor', ; Kaj tabako kaj likvor'! ; Post la vivo kun enu' ; Dormos nien tomba tru'!

& La kampokanto:

< Ripete 21 sed rekante 10 el 49 batoj por strofo, entute 245 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4892. Verkis Rune Lindström. El sveda tradukis Kukoletto (1993).>

(#Melodio:

<1,8:2,3> (SO /SO3Do DoDo /DolMi SoDo /Do3TI ReTI /SO
O;SO /SO3LA TIDo /RelMi FaLa /La3So SoDo /Mi;

dodo /La3Fa DoFa /La ah;LaLa /So3Mi DoMi /So oh;Do
/SO3LA TIDo /ReMi FaRe /Re3Do DoMi /So; dodo /La3Fa
DoFa /La ah;LaLa /So3Mi DoMi /So oh;Do /SO3LA TIDo /ReMi
FaRe /Re3Do DoTI /Do o;)×5)+

(&Strofoj:

'1 Mi /iris al la /ka2mpo, kaj
/ĝoja estis /mi ; ĉar /mi
renkontos /E2mman, kaj /mia
estis /ŝi (; kaj do /tiel pensis
/mi ; ke ja /dolĉa idi/li' ; 'stas
/havi ami/kinon kiun /ami kun
pa/si'.)×

'2 Sed en la kampo ŝi jam estis
je mia mir' ; sed ŝi ne estis
sola, ĉar ŝi sidis apud vir' ((×;;
kaj do tiel pensis mi ;) tiel
inoj estas, fi ; ja faras ili
multon ekster nia fantazi'.)×

'3 Malantaŭ betuleto eksidis
mi en plor' ; mallumis la
animo kaj pezis la humor' (.....
tiu viro havos pli ; gustumos li
tranĉilon mian, tuj do mortos
li.)×

'4 Sed aj, komencis pluvi kaj
pluvo frapis plej ; kaj stalen ili
iris, kaj kuŝis en fojne' (.....
estas aĉa vido ĉi ; alia kisas
inon, ŝin mi amas kun pasi'.)×

'5 Veninte hejmen de la kamp',
mi prenis da drinket' ; ĉar
vesto estis akva, sed gorgo
seka kret' (..... ke ĝin
malsekigu pli ; ĉar gorgo
sekos pli rapide ol la vesto
ĉi.)×)

& Pluvo:

< Rekante 29 el 49 batoj por strofo, entute 245 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis L. L. Zamenhof (poemon 1909; rekantaĵon 1911). Baladigis Martin Strid (2017) per nova melodio.>

(#Melodio:

<:49> (/miimimi faamimi re doTi LaLa;La doododo TiiLaLa Ti mii;mimi miimimi faamimi re doTi La; LaLa doododo Ti doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: a;mi miimimi faamimi re doTi LaaLa;La doododo TiiLaLa Tiimimi miimi;mi miimimi faamimi re doTi LaaLa;La doododo TiiLaLa Tiimimi miimi;mi miimimi faamimi re doTi LaaLa;La doododo TiidoTi LaaLaSi La La a)

)×5)+

(& Strofoj:

'1 /Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas ; Senĉese, senfine, senhalte, ; El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter' ; Are gutoj frapiĝas resalte.

(×:; **Vi, "Verda radio", ekbrilo, karulo, ; Per brilo fortika, per brilo konstanta, ; Kaj malgraŭ malhelpoj de l' norda nebulo ; Vi restu fidiga, vi restu lumanta, ; Ke ni vin rigardu kaj diru: "ĝi estas, ; Ĝi provojn ne faras, ĝi vivas, ĝi restas".)**)

'2 Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo ; Murmurado penetras mistera, ; Mi revante aŭskultas, mi volus kompreni, ; Kion diras la voĉo aera.

'3 Kvazaŭ la sopir' en la voĉo kaŝiĝas ; Kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro... ; Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja, ; En mi batas konfuze la koro.

'4 Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj, ; Rememore en mi reviviĝis, ; Aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos, ; Kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

.

'5 Mi ne volas esplori la
senton misteran, ; Mi nur
revas, mi ĝuas, mi spiras; Ion
freŝan mi sentas, la freŝo min
logas, ; Al la freŝo la koro min
tiras.)

& Trompulo:

< Ripete 31 sed rekante 29 el 49 batoj por strofo, entute 245 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4874. Verkis kaj komponis Stefan Demert. El sveda tradukis Martin Strid.>

(#Melodio:

<1,8:2,3> (dodore /mimi mimi /redo dore /mi mi /redo; dodore /mimi mimi /redo dodo /SoSo TiTi /do; hmi /mimi mimi /soso soso /mi mimi /so; hmi /rere rere /rere dore /mimi mimi /do;

(#Rekantaĵe: (hmi /so oso /fami ih /so3so faso /fami ih /so oso /fami mimi /SoSo TiTi /do oh)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Politi/kisto, jen trom/pulo, vera /trompe/gulo, Politi/kisto, jen trom/pulo kiel /ĉiuj estas /ni ; Fe/liĉon havos /vi pro lia /potenca/kir' ; sed /post la balo/tado li for/gesis pri la /dir' ; Ni /ĉiam /trompas, /trompe trompe /trompas, /ĉiam /trompas, ĉiu /hom' en tuta /mond'.

'2 (': Meteologo, (×: **jen trompulo, vera trompegulo**),) (: meteologo, **jen trompulo**) (×: **kiel ĉiuj estas ni** ;) Se sunon li desegnis viahejme sur la map' ; la postan tagon akvo inundos ĝis la kap'

(×:; **Ni ĉiam trompas, trompe trompe trompas, ĉiam trompas, ĉiu hom' en tuta mond'.**)

'3 Juĝisto Nun juĝas li virinon pro malbona norm' ; sed mem ne zorgas, en kies lito estos dorm'

'4 Kuracisto Li skribas certigilon pri saneca via fort' ; la postan tagon eble vi falos en la mort'

'5 Trubaduro Tekston kaj muzikon, kredas vi, li skribis mem ; sed ŝtelis melodion kaj tradukis, jen poem'

& Vilaĝanino:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 245 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per malnova sveda melodio kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:35 > (

/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mi; mi3re doTi rere mi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a;)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /En vilaĝo de montaroj, ;
For de l' bruoj de l' kulturo, ;
Vivas ĝis en niaj jaroj ;
Prototip' de pranaturo.

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto.**)

'2 Tie mi knabinon konas, ; –
Pura koro, ŝtalmuskoloj, – ;
Kies brusto ne bezonas ; la sekreton de piloloj!

'3 Kiam ŝia buŝ' – por brili – ;
Sorbas majmatenan roson, ;
Estus peke alkonsili, ; Ke ŝi uzu dentobroson.

'4 Ĉar okuloj, vangoj, buŝo ;
Estas fruktoj aŭtentikaj ; Sen bezono de retuŝo ; Per artaĵoj kosmetikaj!

'5 Ŝi ne dancas, – ŝi ne fumas, ;
(Tio ŝajnas jam legendo!) ;
Kaj nur ete ŝi parfumas ;
Tolĉemizojn per lavendo;

'6 Ŝi ne revas pri teatro, ;
Tualeton ŝine faras, ; Kaj ŝi tiel al la patro ; Ĉiujare sumojn ŝparas.

'7 Mi admiras vin, knabino, ;
Kaj glorkante mi proklamas ;
Virton de l' vilaĝanino, ; Sed – mi urbaninon amas... ..)

& La gaja studento:

< Ripete 24 el 41 batoj por strofo, entute 246 paŝoj dum 3 minutoj. El germana? tradukis nekonato.>

(#Melodio:

<:4,5> (h /So3So dodo mimi so; /fami re mire do; /So3So dodo mimi so; /fami remi do o; /re3mi remi remi re; /re3re mifi soSo So; /So3So dodo mimi so; /fami re mire do; /So3So dodo mimi so; /fami remi do o)×6)+

(&Strofoj:

'1 Jen studento antaŭ vi,

(×:: **Ju-kaj-da, ju-kaj-di, ;**)

Ano de l' Akademi',

(×:: **Ju-kaj-da, kaj-di, ;**)

Esti juna kaj student', ; Ho,
plej gaja vivmoment'.

(×:: **Ju kaj di-a-di-a-da ; Ju
kaj di, ju kaj da, ; Ju kaj di-
a-di-a-da, ; Ju kaj di-a-da.)**

'2 Venas onkla poŝtmandat',
..... La unuan de l' monat'

La poŝtiston kun honor' ; Tiras
mi al mia kor'.

'3 Ho, biero kaj kolbas'!

Plena estas mia kas' Ho!
plezuro kun fraŭlin', ; Kiel mi
amegas vin!

'4 Ĝoji pro la sankta pag'

Volus mi je ĉiu tag', Sed la
mono, ve, ho ve, ; En la poŝo
restas ne.

'5 En la mezo de l' monat'

Mi en l' universitat' Ofte
studos kun fervor' ; Ĉar la
mono estas for.

'6 Glas' kaj poŝo sekaj nun!

..... Grava estas mia pun',
Do se mi amuzis vin. ; Volu vi
regali min.)

& Supren la korojn:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 246 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (/laasofa mire do3re mifa so; laalala lala sola tila somi; laalala lala sofa mire do; faafafa fafa sofa mire dodo;

(#Rekantaĵe: lala lala tila so fa mi i; fafa mimi soso mimi remi fare mi; lala lala tila so fa mi i))×6)+

(&Strofoj:

'1 /Ho, kavaliroj de la nova sent', ; Ekbruligantoj estu ni de l' koroj! ; Flugu de kor' al kor' en homa gent' ; Hele flamantaj festaj fajrofloroj!

(×: **Tondre paŝu, kantu forte ni ; Nia rondo en la mondo dancas plankon ĉi ; Tondre paŝu, kantu forte ni.**)

'2 Ĝemas mizere, en mallum' dronante ; Tuta homaro sub malbona sorĉ', ; Brilu al ili ĉie, lumdonante, ; Koro flamanta, kiel gvida torĉ'.

'3 Supren la korojn samideana rond'! ; Montru ni ilin al disonanca mond'! ; Ĉar en niaj koroj estas fundament' ; De la pac', de l' ben', de l' sankta, nova sent'.

'4 Ho kavaliroj de la Pentekost'! ; Lukti ni devos en bataloj multaj: ; Jen malamikoj: la anima frost', ; Blinda malam' kaj malkomprenoj stultaj.

'5 Veoj alarmas por batal' benata, ; Grandaj mizeroj vokas nin por arm'. ; Jen la armiloj: la laboro frata, ; Brak' brakumanta kaj la kora varm'.

'6 Supren la korojn, samideana rond'! ; Montru ni ilin al disonanca mond'! ; Ĉar en niaj koroj estas fundament' ; De la pac', de l' ben', de l' sankta, nova sent'.

& Al la juda foririnto:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. Poemon verkis Lodewijk Cornelius Deij. Per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado baladigis Martin Strid.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dore mi mimi miimido re fa;mi mimimi mimimi mimido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Li fermis la kofron,
manpremis – adiaŭ! ; Sen ia
protesto li iris... Hodiaŭ

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun
trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas
; Jen en amika ĉen' ; Dancu
nun trankvile.)**

'2 mi tion komprenas; li povis
nur miri, ; ke mi, la kristano,
lin lasis foriri.

'3 Kun kapo klinita la kofron li
portis. ; Li iris la vojon al
Auschwitz kaj mortis

'4 sen ia protesto. Li povis nur
miri, ; ke mi, la kristano, lin
lasis foriri.

'5 Kaj iam la filo kun filo
parolos, ; kaj tiu demandos, la
veron li volos.

'6 La mia silentos... kaj povos
nur miri, ; ke mi, la kristano,
lin lasis foriri.

'7 Ni sentis kompaton kaj
monon kolektis, ; dum kelkaj
el ni la infanojn protektis.

'8 Sed Auschwitz ekzistis! Nu,
kion plu diri? ; Ke mi kaj ke
vi... ni lin lasis foriri.)

& Ĉe kuracisto Zamenhof:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Cezar "por karikaturado de la desegnisto Eder Benedetti". Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;
(#Rekantaĵe: mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)
)×8)+

(& Strofoj:

'1 "/Doktoro2 mia, kuracisto! ;
Ĉu estas ĝi inflam' de histo?

(×:: **En la ĉen', dancu nun
trankvile ; ĉiuj ni trankvilas
; jen en amika ĉen' ; dancu
nun trankvile.)**

'2 Jubile mi la tagojn startas. ;
Doktoro, ĉu mi bone fartas?

.....

'3 Mi krevos tuj pro energio. ;
Sukcesas al mi simple ĉio.

'4 Subite plenas mi de ĝojoj, ;
kurante saltas mi sur vojoj!"

.....

'5 Doktoro Zamenhof
rigardas: ; "Jen verda koro
sankte ardas."

'6 Kun ĝojo la doktoro diras, ;
ke ne malsano lin inspiras.

'7 "Amik', vi estas tute sana, ;
serĉado plua estus vana.

'8 Ne estas ja malsana tristo. ;
Vi iĝis nur esperantisto!"

& Dirvoko de Hjalmar:

<Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. El praislanda tradukis Baldur Ragnarsson (Norda Prismo 4, 1957). Baladigis Martin Strid (2016) per nova rekantaĵo kaj modifo de funebra marŝo el svedlingva parto de Finnlando, "Hindriks sorgemarsch".>

(&Melodio:

<1,4:31> (/LaLaLaLa SiLa; TiiTire doTi; LaaLado TiiLa;La SiMi MiMi; LaaLaLa SiiLa;La TiiTiTi SolLaTildo; reerere doTi; LaTi dore;

(#Rekantaĵe: mi3mi reedodo Tire doTi; Laadodo TiiLaLa SiMi MiiFiSi Lado TiLa; mi3mi reedodo Tire doTi i)

)×8)+

(&Strofoj:

<Oddur diras:>

'1 Kio al vi, Hjalmar? ; Haŭto mortpalas, ; certe febligas ; vin lezaj vundoj; kasko fenditas ; kaj dura kiraso; vidas mi vivon ; vin forlasi.

(×: **Iris ili batali brave ; Hjalmar kuraĝa kaj Orvar-Oddur vikingojn venkis ; Iris ili batali brave.**)

<Hjalmar diras:>

'2 Dekses vundojn ; kaj veston taŭzitan ; mi havas, kaj vidon ; volvis nigreco; koron enkuris ; klingo glava, ; akra rapiro ; pinte venena.

'3 Kvin mi havis ; kulturkampojn, ; sed min tedis ; terlaboroj; nun mi kuŝas ; kontraŭ morto, ; vundita glave ; sur Griz-insulo.

'4 Trinkas en halo ; de l' hejmo
patro ; bieron noblaj ;
eskortuloj; lacigas viglajn ;
virojn drinkado, ; sed min
glavspuroj ; spasme
turmentas.

'5 Forlasis mi ; la lume belan, ;
brilevestitan ; tronulinon. ;
Veriĝos diroj ; drastaj ŝiaj, ; ke
mi revenos ; post venko
neniam.

'6 Forlasis mi ; allogajn
kantojn ; de junulinoj ; pro
luktoj armilaj; pene rapidis ;
forvelante ; lastan fojon ; de
amikoj miaj.

'7 Movu de mano ; ruĝan
ringon, ; portu al larma ; filino
de l' reĝo; knedos ŝian ; koron
ĉagreno, ; ke ne mi venos ;
denove Upsalon.

'8 Korvo grake ; de granda
arbo ; flugas kaj aglo ;
akompanas; al aglo alta ; mi
donas propran ; predon kaj
mian ; sangon salan.)

& La vulpo kaj la korvo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;
(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)
)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Flatate, gardu vian saĝon. ;
La korvo ŝtelis for fromaĝon
(×: **En la ĉen' ; Dancu nun
trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas
; Jen en amika ĉen' ; Dancu
nun trankvile.)**

'2 de ie, kaj por ties manĝo ;
sidiĝis sur tre alta branĉo.

'3 La vulpo, kiu tre malsatis, ;
rigardis ĝin kaj jene flatis:

'4 "Ho korvo! Viaj plumoj
brilaj! ; Kie troviĝas do
similaj?

'5 Kaj la vizaĝo, la staturo! ;
Vin vidi estas ja plezuro!

'6 Se via voĉo estas klara, ; vi
vere estas senkompara!"

'7 La korvo, por akiri plaĉon ;
per sia voĉo, grakis vante,

'8 de l' bek' faligis la
fromaĝon, ; la vulp' ĝin portis
for kurante

& Liss Ulov Larsson:

< Ripete 15 sed rekante 11 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4138. El sveda tradukis Kukoletto (1993). Politika satiro pri Liss Olof Larsson (1838-1896), sveda parlamentano de kampuloj de Dalekarlujo. Klarigoj (*): '5 Princo: reĝido ; Klina staro: riverenco. '6 Diri onklo al: esti familiece kun aĝulo. Dalekarloj famas pro tio ke ĉiujn, inkluzivub la reĝo, ili traktas als egalulo. '8 Liptabako: sveda kutimo suĉi muelitan tabakon metitan inter supra lipo kaj dentoj.>

(#Melodio:

<2,4:31> (h /So dodo do dodo Ti rere So o; SoSo Tire SoSo Tire do mimi so o;so la fafa fa fafa so dodo mi i; SoSo Tire SoSo Tire do o;)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Liss Ulov Larsson al
Stokholm per rel' ; bule fili,
bule fili, Stokholm per rel' ; Li
venis al reĝa loĝeja kastel' ;
Bule fili, bule fili, bum.

'2 Sidis la reĝo kaj (': skribis
sur tron')

(×:; **bule fili, bule fili,**)

(,: skribis sur tron' ;) kaj brile
glimadis sur kapo la kron'

(×:; **Bule fili, bule fili, bum.**)

'3 "Saluton, kar-Liss," diris
reĝo al mi "Mi celas
konstrui fervojon por vi."

'4 "Jes," diris Liss, "mi kredas
al sign' se ne estos fera, ni
havos el lign'."

'5 Paŝis en pordo la princa
par'* princino sur sojlo en
klina star'*.

'6 "Aŭdu, kar-Liss," diris reĝo
al mi "Ĉu rajtas la knab'
diri onklo* al vi?"

'7 "Jes," diris Liss, "rajtigu ni
lin kaj tion jam ankaŭ rajtu
princin'."

'8 Princino min kisis sur buŝo
kaj frunt' sed pro
liptabako* mi hontis kiel
hund'.

